

Kiamaniere veni en la ĉielon?

El la plumo de prof. d-ro inĝ. Werner Gitt

La plimulto de la homoj vivas ekskluzive por ĉi tiu mondo.

Oni orientiĝas en sia vivo laŭ elektitaj celplanoj. Se oni volus per kelkaj vortoj resumi, kion aspiras la plimulto de la homoj, do oni povus tion esprimi per tri kapvortoj: *riĉeco, gloro, feliĉo*.

Multaj homoj alstrebas riĉecon, kelkaj el ili ankaŭ sukcesas akumuli multajn bonaĵojn de tiu ĉi mondo. Tiel nur 400 plej riĉaj amerikanoj posedas 872 miliardojn da dolaroj. La fondinto de la entrepreno Microsoft Bill Gates estis per 43 miliardoj da dolaroj la plej riĉa persono de Usono kaj de la mondo. La mondĉampiono en la vetkuro „formula 1” Michael Schumacher salajras por unu konkuro 2,9 milionojn da dolaroj. Kiam li en la jaro 2004 finis sian karieron, li 212-foje finveturis „grand prix”; tiel li por ĉiu tago salajris 125.778 eŭrojn. La Biblio tamen nin avertas: „Kiam kreskas riĉeco, ne atentu ĝin per via koro” (Psl 62, 10b).

Nian avidon je gloro kaj agnosko en tiu ĉi mondo ni neniam povas satigi. Tion ni esprimas diversmaniere, tial ni nomumas homojn por honoraj urbanoj, honoraj prezidantoj kaj honoraj estroj. Ankaŭ la „belecreginoj” apartenas al tiu ĉi kategorio, tial oni interalie elektas „Miss Germany”, „Miss World”, „Mister Universum”. Multaj regantoj en la tempo de sia vivo igis skulpti portretskulptaĵojn kaj starigi monumenton por si mem. Foje jam tre junaj homoj havas avidon por starigi al si monumenton. *Leonardo Di Caprio*, la ĉefrolulo en la filmo „Titanic” havis nur 24 jarojn, kiam li mendis realigon de bronza statuo de sia korpo, por ke la sekvaj generacioj rememoru pri li. La homoj serĉas gloron ĉe aliaj homoj. Laŭ la letero de Paŭlo al Romanoj 3, 23 ni tamen bezonas la gloron ĉe Dio!

La estrada gazetaro vivas de tio, ke ĝi raportas pri la feliĉo – prefere ni diru: pri la ŝajna feliĉo – de aliaj homoj. Subite aperas ku alia viro aŭ alia virino, kaj jam la tuta antaŭa feliĉo malaperis. La germana televida moderato kaj verkisto s-ino *Hera Lind* havas kvar infanojn kun iu viro, kun kiu ŝi ne vivas en geedzeco. Sed oni ŝin gloras kiel *elstaran virinon*, ĉar laŭdire ŝi tenas la familion kaj samtempe sian karieron firme en siaj manoj. Kaj subite aperas iu alia viro, mem jam edziĝinta, kaj ĉio deantaŭe valoras plu nenion. Nun la rado de la fortuna ektorniĝas denove. La infanoj estas disdividitaj kiel ĉe la infana ludnombrodo: „Unu ĉi, alia tien, kiu ĉasas, kiu fuĝas, ĉu sin kaŝas, ĉu ekfuĝas, unu, du kaj tri, nun ĉaskuras vi...” Ili estas la plej trafitaj venkigitaj de tiu ĉi „hazardludo por feliĉo”...

La poeto s-ino Eleonore Fürstin von Reuß (1835-1903) en la tria strofo de sia poemo „Tra la mond’ mi iris” tre trafe priskribis nian senfruktan serĉadon en la ĉimonda vivo:

*Ili serĉas, kio ne troveblas
en la amo, gloro kaj feliĉo,
pekoplenaj ili reen venas,
sen kontento restas delico.*

La demando pri la eterneco restas en plej multaj kazoj netuŝita.

Eĉ se kelkaj homoj tamen pensas pri sia vivofino, la eterneco restas mirige netuŝita. La usona aktorino Drew Barrymore ludis kiel kvinjara infanstelulo la ĉerfrolon de „Gerti” en la fantazia filmo „E. T. La loĝantoj de aliaj planedoj”. Pli ol 350 milionoj da spektantoj vidis la filmon. En la aĝo de 28 jaroj ŝi eldiris tion ĉi:

„Se mi mortus antaŭ mia kato, nutru ĝin per mia cindro, ja tiukaze mi almenaŭ plu vivos en mia kato.”

Ĉu ne temas pri terura senperspektiveco?

La astronomo *Eugene Shoemaker* fariĝis tutmonde konata kiel kunmalkovranto de la kometo Shoemaker-Levy 9, kiu en la jaro 1994 spektakle abrupte falis sur la planedon Jupiteron. En la tempo de sia vivo li por sia enterigo antaŭdecidis ion specialan, ke oni transportu lian cindron sur la lunon. Per la usona kosmosondo „Lunar Protespector” oni tion realigis 2-an de aŭgusto 1999. Sed por la eterno tio havas neniun signifon.

Kiucele la homoj venadis al Kristo, dum li vivis sur la tero?

En la tempo de Kristo multaj homoj venis al li. Se ni observas la aferon pli proksime, ni rapide ekkonos, ke preskaŭ ĉiam temis pri kelkaj ĉi-mondaj malfacilaĵoj:

- Dek lepruloj serĉis resaniĝon (Luk 18, 13).
- Al Jesuo venas viro, kiu atendas de la Sinjoro interveni en lia konflikto pri la heredo (Mat 12, 13-14).
- Fariseoj volas ekscii, ĉu pagi al la imperiestro la imposton – tamen en intenco submeti al Jesuo la falilon (Mat 22, 17).
- Je iu alia okazo la fariseoj kaj la skribistoj postulis signomiraklon (Mat 12, 38).
- Viro kun kaduka mano serĉis resaniĝon (Mat 12, 10 in 13).
- Virino el Kanaan venis al Jesuo, por ke ŝia filino estu liberigita de la malbona spirito (Mat 15, 22).
- Virino, perdinta sangon, volis resaniĝi de sia malsano (Mat 9, 20).
- Revekado de la filino de Jair en la vivon (Luk 8, 41 k. 54).

Sed nur malmultaj homoj venis al Jesuo, por aŭdi de li, kiamaniere veni en la ĉielon.

Krom liaj disĉiploj nur tre malmultaj demandis pri la eterna vivo. Iun tagon tamen venis al Jesuo riĉa junulo per demando: „Bona Majstro, kion mi faru por heredi eternan vivon?” (Luk 18, 18) Li ricevis respondon, kion li faru, nome, ke li vendu ĉion, kio atentigas lian koron kaj postsekvu lin, Jesuon. Tion li ne faris, „ja li estis tre riĉa”. Poste troviĝis ankaŭ tiaj homoj, kiuj la ĉielon eĉ ne serĉis, sed renkontante Jesuon li atentigis ilin pri tio, kaj ili kaptis la okazon. Zaheo volis vidi Jesuon el pura kuriozo, sed li trovis la ĉielon. Post la vizito en la domo de Zaheo tiu – se ni tiel diru, dum kafopaŭzo – trovis la ĉielon. Jesuo post la renkontiĝo konstatis: „Hodiaŭ venis savo al ĉi tiu domo” (Luk 19, 9). La virino apud la putro de Jakob nur

volis ĉerpi akvon, sed ŝi renkontis Jesuon kaj akiris la eternan vivon en la ĉielo. Tiuj homoj dum sia matenmanĝo tute ne pensis pri tio, ke tio estos la tago, kiam ili trovos la ĉielon. Kaj ankaŭ al ni tio povas tiel okazi.

Kiamaniere ni do povus trovi la ĉielon?

Post ĉio-ĉi, kion ni ĝis nun diris, ni povas noti jenon:

- Ni trovas la ĉielan regnon en *tute difinita tago*. Ni ne povas kreski dum jaroj pli kaj pli en ĝin. Estas bone tion scii, ja se tiel, do ankaŭ hodiaŭ tio estas ebla.
- La akiro de la ĉiela regno *ne estas ligita al iu ajn merito, kiun ni devus antaŭe akiri*.
- Ni povas trovi la ĉielan regnon tute *nepreparitaj*. Por tio ne estas bezonata iu anticipa studado nek estas bezonataj bonaj faroj, kiujn ni devus antaŭe praktiki.
- La ĉiela regno ne estas nur io por ni tre grava, ĝi estas la plej grafa afero por ni; cetere Jesuo ne kondukus ĉiun interparolon al tiu ĉi temo.

Konsiderante tiujn ĉi punktojn ni jam ekkonas, ke kelkaj havas komplete falsan imagon pri tio, kiamaniere oni povus veni en la ĉielon. Iu kanzonistino kantis kanzonon pri la klaŭno, kiu post la longjara laboro en la cirko retiriĝis: „Certe li venos en la ĉielon, ja li faris la homojn feliĉaj.”

Iu riĉa donacanta sinjorino igis konstrui domon por senhavaj personoj en ilia lasta vivperiodo, en kiu povis vivi sub prizorgo 20 virinoj. Tio sonas bele, sed bedaŭrinde tio ĉi estis ligita al iz kondiĉo: la virinoj devis akcepti devon ĉiutage dum unu horo preĝi por la animbono de la donacantino. Tamen, kiu povus scii, ĉu 20 preĝantaj virinoj sufiĉas kaj ĉu unu horo da preĝado sufiĉas? Probable devus troviĝi 100 preĝantaj virinoj, kiuj preĝus dum tri horoj ĉiutage? Ni tuj vidas: kiam ni kovas proprajn planojn, kiamaniere atingi la eternan vivon en la ĉielo, ili ĉiuj estas komplete falsaj.

Sed kio kondukas nin vere en la ĉielon? Por tion ĉi klare demonstri, Jesuo uzis alegorion. Mi mem sentas tiun ĉi alegorion kiel unu el la plej klaraj kaj trapenetraj.

Mi tuj volas noti tion ĉi: La plej granda tragikeco en la homa vivo ne estas sensukcesa geedzeco nek falo de akcioj nek perdo de sano nek perdo de bona laborloko nek morto! La plej tragika perdo estas la perdo de la eterna vivo! Sed kiamaniere ni povas ĝin akiri? Tion klarigis al ni Jesuo ĉe Luko 14, 16-24 tiel draste, ke ni povas tion facile memori. Estas viro (en la alegorio reprezentanta Dion), kiu preparas grandan feston (metaforo por la ĉielo) kaj unue dissendas invitilojn nur al elektitaj personoj. La respondoj estas katastrofaj: „*Kaj ĉiuj tiel same komencis peti pri indulgo. La unua diris al li: Mi aĉetis kampon, kaj mi nepre devas eliri, por ĝin vidi. Alia diris: Mi aĉetis kvin jugojn da bovoj, kaj mi iras, por ilin provi; mi petas, kalkulu al mi indulgon. Kaj alia diris: Mi edziĝis kun edzino, kaj tial mi ne povas veni.*” Jesuo finis sian alegorion per la verdikto: „*Mi diras al vi, ke neniu el tiuj viroj invititaj gustumos mian vespermanĝon!*”

Tiu ĉi alegorio tre ilustre klarigas, kiamaniere ni povas la ĉielon ĉu akiri ĉu perdi. La diferenco estas en tio, ĉu ni la inviton akceptas aŭ malakceptas. Ĉu la afero povus esti pli simpla? Tamen ĉio-ĉi ne helpas! Se iam en la ĉielo ne troviĝos multaj homoj, tio ne estos pro tio, ke oni tion nur malfacile povas kompreni, sed ĉar la plimulto de la invititaj la inviton refutis. Ili simple ne volas veni tien!

Tial ni de ĉiuj tri viroj nenion povas lerni. Ili ne estas nia modelo, ja neniu el ili venos al la nupto! Ili ĉiuj malakceptas la ĉielon. Bone, ĉu nun la festo ne okazos? Certe ĝi okazos! Nun la mastro dissendas siajn sklavojn al ĉiuj direktoj. Nun la invitiloj ne plu estas presitaj per ora tranĉo; nun temas pri simpla voko: „Venu!” Iru al heĝoj kaj bariloj kaj invitu la pasantojn; skribu pri tio en la leteroj de legantoj al gazetoj kaj magazenoj! Invitu ĉiun, kiu iel ajn akceptas la inviton. Ĉiu, kiu akceptas la inviton, ricevos certigitan lokon en la ĉielo. Kio okazas? Jes, la homoj venas – eĉ en grandaj aroj. Post certa tempo la sinjoro faras interbilancon – ankoraŭ troviĝas liberaj lokoj. Denove eliru! Denove invitu! Jen tio estas la niatempa situacio. Ankoraŭ troviĝas liberaj lokoj en la ĉielo, Dio igas anonci: Venu, okupu vian lokon en la ĉielo. Estu saĝa kaj rezervu por vi la lokon por la eterno! Faru tion hodiaŭ!

La ĉielo estas io neimagebl bela. Tial la Sinjoro Jesuo komparas ĝin kun granda festo. Tiun festadon ni neniel maltrafu. Nur tiu, kiu estas tiel malsaĝa kiel la tri nomitaj viroj, ne akceptas la inviton. La teksto en la 1-a letero al Korintanoj 2, 9 tekstas jene:

„Tion, kion okulo ne vidis kaj orelo ne aŭdis, kaj kio en la koron de homom ne eniris, Dio preparis por tiuj, kiuj Lin amas.”

Nenio, vere nenio en tiu ĉi mondo eĉ proksimume ne estas komparebla kun la ĉielo – tiel neimageble bele tie estas! La ĉielo do estas ege valora afero. Iu malfermis por ni la pordon en la ĉielon, Jesuo, la Filo de Dio! Al li estu nia danko, ke oni tiel simple povas eniri. Ni havas nur unu taskon: tion voli.

La savo per Jesuo Kristo

En la Agoj de la apostoloj 2, 21 ni legas tre gravan versiklon: *„Kaj ĉiu, kiu vokos la nomon de la Eternulo, saviĝos.”* Tio ĉi estas la esenca frazo el la Nova testamento. Kiam Paŭlo troviĝis en la malliberejo de Filipoj, li post la noktomezo interparolis pri la evangelio kun la gardisto. Paŭlo trafis la esencon: *„Kredu al la Sinjoro Jesuo, kaj vi estos savita, vi kaj via familio”* (Agoj 16, 31). Tiu ĉi mesaĝo estas skiza kaj kerna, sed decida, ŝanĝanta la onian vivon. Jam dum la sama nokto la violenta karcergardisto, kiu nur iomete pli frue skurĝis Paŭlon kaj Silon, konvertiĝis. Kaj nun ni legas: *„Kaj li kondukis ilin en tiu sama nokto horo kaj lavis al ili la batovundojn; kaj baptiĝis senprokraste li kaj ĉiuj liaj domanoj”* (Agoj 16, 33).

De kio savas Jesuo? Tion ni nepre devas scii: Jesuo savas el la infero por la ĉielo. Ambaŭ itineroj estas poreterne. Unu el ili **terura**, la alia **brilega**. Je la persono de Jesuo decidiĝas ĉio. Nia poreterna estado dependas de unu nura nomo: Jesuo!

Kiam mi troviĝis en Pollando en la prelegturneo, ni por unu tago vizitis la iaman mortigkoncentrejon Auschwitz. Tie en la erao de la tria regno de naziismo okazis teruraj aferoj. Ek de februaro 1942 ĝis novembro 1944 tie pli ol 1,6 miliono da homoj, pliparte judoj, estis mortigitaj per gaso kaj poste kremaciitaj. Nuntempa literaturo parolas pri tio kiel pri la „infero de Auschwitz”. Iu komentatoro antaŭ nelonge diris en iu televida programo: „La dudeka jarcento ĉiujn imagojn pri la infero ne nur realigis, sed ilin eĉ superis.” Ĉu tio ĉi estas vera? Mi meditis pri tiu ĉi karakterizo, postkiam iu pola deĵoroficisto nin kondukis tra la gasmortiga ĉelo, en kiu dum unu procedo estis mortigitaj 600 homoj samtempe. Estis neimageble terure, sed ĉu vere tio jam estis la infero?

Kiel ekskursista grupo ni povis inspekti tiun gasĉelon nur pro tio, ke tiu terura afero en la jaro 1944 trovis sian finon. Nun tiuj konstruaĵoj staras je dispono por inspekti, sed neniu plu tie estas turmentita aŭ gasvenenigita. La gasĉeloj en Auschwitz estis tempe limigitaj, sed tio la

infero ne estas. Ĝi daŭras poreterne kaj oni neniam ĝin povas inspekti. En la koridoro de la nuntempa muzeo tie mia rigardo fiksiĝis sur iu kolorfotografio. Ĝi montras la krucon kun la korpo de Kristo, kiun verŝajne iu kaptito helpe de najlo gravuris en la moron. Ankaŭ tiu nekonata artisto mortis en la gasĉelo, tamen li sciis pri la savanto Jesuo. Li cetere mortis en la terura loko, tamen la pordo en la ĉielon estis por li malfermita. Sed el la infero, pro kiu nin la Sinjoro Jesuo en la Nova testamento tiel forte avertas (ekz. Mat 7, 13; Mat 5, 29-30; Mat 18, 8) – se ni iam en ĝi troviĝus – el ĝi kondukas neniun vojon kaj savon plu. Ĉar – alimaniere ol la mortiga koncentrejo en Auschwitz – la infero poreterne funkcias, oni ĝin ankaŭ ne povas informe inspekti.

Ankaŭ la ĉielo estas poreterna loko, do la loko, en kiun ni estas vokitaj. Tial permesu vin inviti por veni en la ĉielon. Voku la nomon de la Sinjoro kaj rezervu tiamaniere por vi la ĉielon! Post iu prelego iu damo min demandis: „Ĉu ni vere povas la ĉielon *rezervi*? Tio sonas kvazaŭ en vojaĝagentejo!” Mi konfirmis al ŝi: „Vi devas aranĝi vian rezervitecon. Tiu, kiu ne rezervas, ne atingos la celon. Se vi volas atingi Havajon, vi bezonas validan pasporton kaj aviadilan vojaĝbileton.” Ŝi denove demandis min: „Sed la aviadilan vojaĝbileton iu devas pagi, dum la vojaĝon en la ĉielon ni ne pagas!” – „Ho, jes, la vojaĝbileto por la ĉielo estas eĉ tiom multekosta, ke neniun el ni ne povus ĝin pagi. Tamen ankaŭ ĉi tie iu devas pagi. Ĉar Dio en sian ĉielon ne enlasas pekon, nia peko devas esti rekompencita. Iu estis pagipova kaj ankaŭ efektive pagis, kaj tio estas Jesuo. Li pagis sur la kruco per sia sango. Se tio ne estas la prezo!”

Kion ni devas fari?

Tiel alloga voko de Dio estas dediĉita ankaŭ por ni. Kun aparta emfazo multaj bibliaj tekstoj nin invitas, sekvi tiun vokon:

- „Strebu eniri tra la mallarĝa pordo!” (Luk 13, 24)
- „Pentu, ĉar la regno de la ĉielo alproksimiĝis.” (Mat 4, 17)
- „Eniru tra la mallarĝa pordo, ĉar larĝa estas la pordego kaj vasta estas la vojo kondukanta al la perejo, kaj multaj tra ĝi eniras.” (Mat 7, 13-14)
- „Devigu ilin enveni!” (Luk 14, 23)
- „Ektenu la eternan vivon, al kiu vi estas vokita.” (1Tim 6,12).
- „Hodiaŭ se vi aŭskultas lian voĉon, ne obstinigu vian koron.” (Heb 3,15)
- „Savu vin el ĉi tiu perversa generacio!” (Agoj 2, 40).
- „Kredu al la Sinjoro Jesuo, kaj vi estos savita, vi kaj via familio!” (Agoj 16, 31)

Ĉio-ĉi estas tre petegaj kaj vekantaj ordonoj. Ĉu vi sentas la seriozon, decidemon kaj neprecon en tiuj ĉi tekstoj? Se tiel, do ni agas tre konsekvence, se ni al la invito respondas per preĝo, kiu en libera formulado povus teksti iel kiel tie ĉi:

„Sinjoro Jesuo, hodiaŭ mi aŭdis, ke mi povas veni en la ĉielon ekskluzive pere de vi. Mi volas iam troviĝi apud vi en la ĉielo. Savu min do el la infero, kien mi cetere venus pro mia kulpo. Pro la amo al ni homoj vi senkulpe estis fiksita sur la kruco sur Golgoto por deaĉeti niajn pekojn. Jam tiam vi pensis pri mi. Vi vidas mian kompletan kulpon ekde mia junaĝo – ĉion, kio momente troviĝas antaŭ miaj okuloj, sed ankaŭ ĉion, kion mi jam delonge forgesis. Sed vi scias pri ĉio, vi konas ĉion, ĉiun agadon laŭ propra kulpo, ĉiun falsan motivon en mia koro, ĉio-ĉi estas notita ĉe vi. Mi estas antaŭ vi kiel malfermita libro. Kun mia vivo mi tiel ne povas esti antaŭ vi pravigita. Tial mi elkore vin ĉpetas: Pardonu ĉiajn miajn pekojn kaj purigu min ĝisfunde.

Mi dankas, ke vi elaŭdis min. Mi fidas vian promeson. Sed nun ekposedu mian vivon. Konduku min kaj min akompanu sur la vojo, kiun vi al mi montras. Helpu min demeti ĉion, kio ne trovas pravigon ĉe vi. Pridonacu min per novaj kutimoj, kiuj trovas vian benon. Kaj donu al mi obeeman koron, por ke mi faru, kion via vorto diras. Ne permesu al mi orientiĝi laŭ kelkaj aliaj influoj kaj diversaj homaj opinioj, sed malfemu al mi la aliron al la Biblio, tiel ke mi ĝuste komprenu vian vorton kaj vivu konforme al ĝi. Estu por ĉiam mia Sinjoro, kaj mi volas postsekvi vin. Amen.”

Kelkaj vortoj de la tradukisto

Ekzistas tri diversnivelaj kategorioj de nia esperanta kolegaro. La plej malsupra, en kiu sufiĉas uzi la internacian helpolingvon Esperanton, kiel tion difinis la deklaro el Bulonjo en la jaro 1905. Laŭ tio ankaŭ sekreta policisto en neĵura ŝtato, kiu lernis Esperanton por povi persekuti esperantistojn, tamen estas esperantisto. La meza, kiun alstrebis d-ro Zamenhof, en kiu oni uzu nian lingvon por labori por la paco kaj reciproka amo kaj solidaro de la popoloj. Nur malplimulto tiel konceptas kaj praktikas la porpacan lingvon de Zamenhof. La supra, kiun taskigas al ni la misiordono de Jesuo: „*Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn, baptante ilin en la nomon de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito!*” (Mat 28, 19) Esperanto ne estis inspirita por pli facile negoci kaj komerci, kaj aparte ne por eĉ en la dua lingvo por ĉiu disvastigi pekon kaj maldececon, mensogon kaj blasfemon. Zamenhof diris, ke li ne volas havi ion komunan kun Esperanto, kiu servus ekskluzive nur la komercon; sed ni ne forgesu, ke Dio ne volas havi ion komunan kun Esperanto, kiu servas por malbenado, blasfemado kaj ĉia pekado, esprimita en ĝi.

Se vi tralegis la traktaĵon de d-ro Gitt kaj trovas konsenton kun la enhavo, vi apartenas al la feliĉa tria kategorio de veraj esperantoj, kiu volas uzi tiun ĉi mirindan lingvon unuagrade por disvastigi la ĝojan mesaĝon (evangelion) de nia Savanto kaj Sinjoro Jesuo Kristo. Ne restu en tio sola, sed dividu vian benon kun viaj proksimuloj, ĉu samgentaj aŭ internacie. Kie ajn vi povas, organizu etan biblian grupon, legante la Skribon en esperanta traduko. Vi ne estas invitata aliĝi al iu dubinda kvazaŭkristana sekto aŭ kontraŭbiblia tradicia granda eklezio, sed esti parto de la vera eklezio, fondita de Kristo. Kredante, ke la Biblio estas la vera vorto de Dio, vi jam fariĝis membro de tiu aŭtenta eklezio, kiu adoras Dion ne en hommane masonitaj ŝtonaj temploj, sed „laŭ spirito kaj vero” (Joh 4, 23).

Pri la aŭtoro:

Werner Gitt, prof. d-ro, inĝ. (* 1937 en Raineck, en orienta Pruslando) estis direktoro de la fako „informteknologio” enkadre de la fizik-teknika ŝtatinstituto en Braunschweig. Libroaŭtoro kaj konata reprezentanto de kreismo en Germanio kaj tuta mondo. En la jaro 2002 li pensiigis kaj agadas kiel libera aŭtoro kaj prelegisto kaj kristana misiisto.

Kelkaj gravaj (kristanklerigaj) verkoj de Werner Gitt:

Logos oder Chaos: Aussagen und Einwände zur Evolutionslehre sowie eine tragfähige Alternative. Hänssler Verlag 1980. ISBN 3-77510502-6

Am Anfang war der Urknall? (PDF) - Bielefeld: CLV, - ISBN 3-89397-433-4

Am Anfang war die Information. Herkunft des Lebens aus der Sicht der Informatik. - Holzgerlingen: Hänssler, 2004. - ISBN 3-7751-3702-5

Das biblische Zeugnis der Schöpfung - Holzgerlingen: Hänssler, 2004. - ISBN 3-7751-1492-0

Faszination Mensch. (PDF) - Bielefeld: CLV, 2003. - ISBN 3-89397-649-3

Fragen, die immer wieder gestellt werden. (PDF) - Bielefeld: CLV, siehe auch - ISBN 3-89397-127-0

Schuf Gott durch Evolution? (PDF) - Holzgerlingen: Hänssler, 1988. - ISBN 3-7751-1391-6

Signale aus dem All. (**PDF**) Wozu gibt es [Sterne](#)? - Bielefeld: CLV, 1993. - ISBN 3-89397-705-8

So steht's geschrieben. Zur Wahrhaftigkeit und [Autorität](#) der [Bibel](#) - Holzgerlingen: Hänssler, 2000. - ISBN 3-7751-1703-2

Und die anderen Religionen? (**PDF**) - Bielefeld: CLV, 2001. - ISBN 3-89397-146-7

Wenn Tiere reden könnten (**PDF**) - Holzgerlingen: Hänssler, 1992. - ISBN 3-7751-1528-5

Zeit und Ewigkeit (**PDF**) - Bielefeld: CLV, 2000. - ISBN 3-89397-420-2

Wunder und Wunderbares (**PDF**) - Bielefeld: CLV, 2005. - ISBN 3-89397-658-2

In 6 Tagen vom Chaos zum Menschen. Logos oder Chaos. Woher kommt das Leben?

Naturwissenschaftliche und biblische Grundfragen zur Schöpfung. Aussagen und Einwände zur Evolutionslehre - Hänssler, 6. Aufl., 2002, ISBN 3-7751-3207-4

El la germana tradukis kaj aranĝis – kun la permeso de la aŭtoro – Vinko Ošlak

Retadreso:

oslak.vinko@gmx.at

